

ESPERANTYSTA
POLSKI
POLA ESPERANTISTO



Widok z Nosala na Kuźnicę.

„Esperantysta Polski“

W ROKU 1912

wychodzi regularnie co miesiąc w nieco zwiększonej objętości o rozszerzonym programie.

Roczna prenumerata z „Dodatkami literackim“ 2 rb. 50 k. z przesyłką pocztową.

ADRESO: Warszawa, de Redakcio—Włodzimierska 8. Administr.—Hoża 20.

„Pola Esperantisto“

EN 1912 JARO

aperadas ĉiumonate en pligrandigita amplekso kun plivastigita programo kaj „Literatura Aldono“

Jar-abono kun la „Literatura Aldono“ rb. 2.50 = „S“ 2.65 kun poŝta trasendo.

„ANTAUEN KUN KREDO!“

Literatura Jarlibro de „P. E.“ por 1911 jaro.

La prezo de bela 200 paĝa volumo estas: por abonantoj de „P. E.“ 0,50 Sm.
„ ne-abonantoj 1,00 Sm.

mendebla en la Administracio de „P. E.“, Hoża 20, Varsovio.

La enhavo: *Historiozofio de lingvo internacia* de St. A. Dobrzański; *Mia poŝhorloĝo*, novelo de M. Konopnicka, trad. Kabe; *Par.*, nov. de J. Żuławski, trad. Wł. Grabowski; *Somno-Sierra*, fragm. el „Uragano“ de Wł. Gaŝiorowski, trad. D-ski, *En krepusko*, poezio de Staff, trad. Julian Tuwim; „*La ĝemo de vivo*“, el „Pan Graba“, de E. Orzeszkowa, trad. M. Czerwiński; *Libroj de Profetoj*, filozofiaj poemoj de A. Lange, trad. A. Grabowski; *Fabelo pri homo feliĉa*, nov. de J. Żuławski, trad. M. Czerwiński; *Nalo kaj Damayanti*, el sanskrito trad. A. Lange; *Pluvo autuna*, poemo de Staff trad. Julian Tuwim; *En autuna vespero*, nov. de T. Konczyński, trad. E. Gacki; *Defendo de Ĥonoro*, nov. de Groller, trad. G. C.; *La arlekeno*, nov. de Juliusz Korczak, trad. Bejot; *Al mokantoj*, artikolo de St. A. Dobrzański.

La bela 200 paĝa volumo kun interesa kaj abunda enhavo skribita en perfekta Esperanto devas troviĝen biblioteko de ĉiu amanto de nia lingvo kaj literaturo.

En presado:

La Negro

Kvarakta dramo de St. Przybyszewski (Pšibyŝevski) trad. T. Ficovski. dissendota al

ĉiuj abonantoj de „Pola Esper.“ kiel aldono por unua duonjaro de 1912 jaro.

Od Administracji „Esperantysty Polskiego“.

Uprasza się pp. prenumeratorów o zawiadomienie Administracji „Esp. Pol.“ (Hoża 20) o **zmianie adresu**. Nieregularny odbiór pisma bywa prawie wyłącznie skutkiem niezakomunikowania **nowego adresu**.

Członkowie „Pols. Tow. Esp.“ (Warsz.), życzący sobie w 1912 roku otrzymywać „Esp. Pols.“ raczą go zaabonować w naszej Administracji (Hoża 20), lub za pośrednictwem księgarni. Prenumerata roczna wynosi 2 rb. 50 kop. wraz z „Dodat. Liter.“

Ze wszelkimi reklamacjami prosimy zwracać się tam, gdzie została opłacona prenumerata. Administracja bezpośrednio przyjmuje reklamacje tylko od tych pp. prenumeratorów, którzy nadesłali swe zamówienia i prenumeratę wprost do Adm. „Esp. Pols.“

Co to jest Esperanto?

Esperanto jest to język sztuczny, genialnie rozwiązujący odwieczny problemat Języka Międzynarodowego.

Esperanto jest to język dźwięczny, giętki, logiczny i nader bogaty.

Esperanto zdolny jest wyrazić każde pojęcie i najsubtelniejsze odcienie myśli ludzkiej.

Esperanto jest neutralnym środkiem komunikacji umysłowej dla całej ludzkości.

Esperanto nie ma na celu wyrugowania języków narodowych, lecz ma służyć obok języka ojczystego jako środek pomocniczy w stosunkach międzynarodowych.

Esperanto należy do największych zdobyczy kulturalnych 19 stulecia i ma olbrzymią przyszłość przed sobą.

Esperanto jest dziełem polskiego lekarza D-ra Ludwika Zamenhafa.

Esperanto, jako powstały na ziemi polskiej, przyczynia się do sławy imienia polskiego.

Esperanto daje równouprawnienie językowe w stosunkach z narodami uprzywilejowanymi.

Esperanto usuwa przeszkody w obcowaniu z ludźmi, wynikające z różnojęzyczności.

Esperanto ma gramatykę niesłychanie prostą i łatwą — bez żadnych wyjątków.

Esperanto posiada słownik, składający się tylko z paru tysięcy najbardziej międzynarodowych pierwiałków; każdy inteligentny człowiek zna ich do 50% bez nauki (absolut'a, kultur'o, tendenc'o, aprob'i i t. p.).

Esperanto posiada znaczną ilość słów pochodnych, które się tworzą zapomocą 52 sufiksów i prefiksów oraz końcówek gramatycznych.

Esperanto znakomicie nadaje się nie tylko do mowy potocznej i korespondencji, lecz i do wszelkiego rodzaju dzieł naukowych i literackich, nie wyłączając poezji.

Esperanto dzięki swemu bogactwu, giętkości i logicznej budowie, doskonale nadaje się do tłumaczeń z każdego języka bez zmiany i spaczenia myśli.

Esperanto nie jest językiem martwym, ponieważ ulega naturalnemu rozwojowi, — nie dowolnie jednak, lecz prawidłowo i logicznie, zgodnie z zasadami swej budowy.

Esperanto dzięki swym wyjątkowym zaletom zyskał na całym świecie powszechnie uznanie Instytucje naukowe, znakomici uczeni i myśliciele wypowiedzieli o nim najpochlebniejsze opinie

Esperanto ułatwia naukę innych języków i przyzwyczajają do analizy językowej i syntezy.

Esperanto obecnie jest już rozpowszechniony o tyle, że niema kraju i miasta, gdzieby nie było esperantystów.

Esperanto szczególniejszym uznanem cieszy się w najkulturalniejszych krajach, bo — Francji, Anglii, Niemczech i Ameryce.

Esperanto już obecnie daje doraźną korzyść, umożliwiając stosunki z całym światem.

Esperancki tekst można czytać przy pomocy słownika nawet bez znajomości gramatyki; w żadnym innym języku jest to niemożliwe.

Esperanto nadaje się do prowadzenia korespondencji z ludźmi, nieznanymi tego języka; należy tylko do listu dołączyć „Klucz Esperanto“ cefeča (wazy 1/2 luta i kosztuje 5 groszy).

Esperanto usunie z czasem potrzebę nauki obcych języków, na co teraz w szkołach nieprodukcyjnie marnuje się tyle czasu i sił; zyskany zaś czas można będzie poświęcić nauce języka ojczystego oraz innych przedmiotów, wzbogacających umysł i wiedzę.

Esperanto ułatwi korzystanie z dzieł naukowych i literackich całego świata, gdyż każde dzieło wybitne wystarczy przetłumaczyć tylko na Esperanto, aby uprzystępnić je dla wszystkich narodów.

Esperanto stale i coraz więcej rozpowszechnia się, jak to dowodzą następujące dane:

Esperanckich towarzystw oficjalna statystyka podaje: w r. 1903 — 108, 1905 — 523, 1908 — 1575, 1910 — 1719.¹⁾

Esperanckich czasopism wydawano w r. 1903 — 22, 1906 — 58, 1909 — 89, 1911 — z górą 100.

Esperancka literatura w r. 1910 liczyła około 2000 tomów dzieł tłumaczonych i oryginalnych.

¹⁾ Z nich „Francuzka liga“ liczyła w 1909 r. 8766 członków, a „Esperancki Wszechświatowy Związek“ („U. E. A.“) z Zarządem w Genewie w tymże roku liczył 7500 członków i posiadał w 872 miastach 44 krajów 618 swych konsulów, 765 delegatów i 296 subdelegatów.

Uczmy się Esperanta!

Kompietna gramatyka języka Esperanto.

a) Alfabet.

Aa,	Bb,	Cc,	Ĉĉ,	Dd,	Ee,
a	b	c	cz	d	e
Ff,	Gg,	Ĝĝ,	Hh,	Ĥĥ,	Ii,
f	g	dż	h	ch	i
Jj,	Ĵj,	Kk,	Ll,	Mm,	Nn,
j	ż	k	l	m	n
Oo,	Pp,	Rr,	Ss,	Ŝŝ,	Tt,
o	p	r	s	sz	t
Uu,	Ŭŭ,	Vv,	Zz.		
u	u (krótkie)	w	z		

b) Części mowy.

1) Przedimek jest tylko określony; la, wspólny dla wszystkich rodzajów, przypadków i liczb; nieokreślonego niema.

Przykłady: la homo człowiek, la stelo gwiazda, la maro morze, la libro książka.

2) Rzeczownik kończy się zawsze na o.

Dla utworzenia liczby mnogiej dodaje się końcówka j.

Przykłady: homoj ludzie, steloj gwiazdy, maroj morza.

Przypadków jest dwa: mianownik (przypadek pierwszy, nominativus) i biernik (przypadek czwarty, accusativus); ten drugi powstaje z mianownika przez dodanie zakończenia n.

Resztę przypadków oddaje się za pomocą przyimków: de (od), al (do), kun (z), per (przez), lub innych przyimków, odpowiednio do znaczenia.

Przykłady: patro ojciec, al patro ojcju, patroj ojców (biernik liczby pojedynczej), por patroj dla ojców, patrojn ojców (biernik liczby mnogiej).

3) Przymiotnik kończy się zawsze na a.

Przykłady: kara patro drogi ojciec, kara patrino droga matka, kara infano drogie dziecko.

Przypadki i liczby są te same, co dla rzeczownika.

Przykłady: bonan patron dobrego ojca; junan patrino młodą matkę (bierniki liczby pojedynczej), kleraj homoj świątli ludzie, helaj steloj jasne gwiazdy (mianowniki liczby mnogiej), vi vidis belajn teatrojn wdzialiście plękę teatru (biernik liczby mnogiej).

Stopień wyższy tworzy się przez dodanie wyrazu pli (więcej).

a) najwyższy przez dodanie plej (najwięcej); wyraz niź tlomaczy się przez ol.

Przykłady: Pli blanka ol nego bielszy niż śnieg, plej pura akvo najczystsza woda.

4) Liczebniki główne nie odmieniają się: unu (1), du (2), tri (3), kvar (4), kvin (5), ses (6), sep (7), ok (8), nali (9), dek (10), cent (100), mil (1000). Dziesiątki i setki tworzą się przez proste połączenie liczebników.

Dla utworzenia liczebników porządkowych dodaje się końcówka przymiotnika. Np. unua pierwszy, dua drugi i t. d.

Dla wielorakich — przyrostek obl; triobla potrójny.

Dla ułamkowych — on; duono połowa, kvarono ćwierć.

Dla zbiorowych — op; kvarope we czworo.

Dla podziałowych — wyraz po; po kvin po pięć.

Prócz tego mogą być liczebniki rzeczowne (unu) jedynka, duo dwójka, cento setka) i przysłówkowe (unue po pierwsze, due powtórę i t. d.).

Przykłady: Kvincent tridek tri (533), du mil kvarcent sesdek du (2462).

5) Zaimeki osobiste: mi ja, ci ty, li on, ŝi ona, ĝi ono (o rzeczy lub zwierzęciu — używa się tylko w liczbie pojedynczej); ni my, vi wy (ty), si siebie, ili oni, one, oni zaimek nieosobisty liczby mnogiej.

Zaimki dzierżawcze tworzą się przez dodanie końcówki przymiotnika.

Przykłady: mia mój, moja, moje, via wasz, wasza, wasze.

Zaimki odmieniają się, jak rzeczowniki.

Przykłady: min mnie (biernik liczby pojedynczej), miaj moi, moje (mianownik liczby mnogiej), ŝiajn swoich (biernik liczby mnogiej).

6) Czasownik nie odmienia się przez osoby i liczby. (Np. mi faras ja czynię, la patro faras ojciec czyni, ili faras oni czynią).

Formy czasownika (końcówki:

a) Tryb bezokoliczny ma zakończenie i (fari czynić).

b) Czas teraźniejszy — as (Np. mi faras ja czynię).

c) Czas przeszły — is (li faris on czynił).

d) Czas przyszły — os (ili faros oni czynią).

e) Tryb warunkowy — us (ŝi farus ona uczyniłaby).

f) Tryb rozkazujący — u (faru czyni, czynicie).

Imiesłowy (odmienne i nieodmienne).

a) Imiesłów czynny czasu teraźniejszego — ant (faranta czyniący, farante czyniąc).

b) Imiesłów czynny czasu przeszłego — int (farinta który uczynił).

c) Imiesłów czynny czasu przyszłego — ont (faronta który uczyni).

d) Imiesłów bierny czasu teraźniejszego — at (farata czyniony).

e) Imiesłów bierny czasu przeszłego — it (farita uczyniony).

f) Imiesłów bierny czasu przyszłego — ot (farota mający być uczyniony).

Wszystkie formy strony biernej tworzą się za pomocą odpowiedniej formy słowa esti (być) i imiesłowu biernego danego słowa: używa się przytem przyimka de (np. ŝi estas amata de ĉiuj — ona jest kochana przez wszystkich).

7) Przyelówki mają zakończenie o.

Stopniowanie podobne jest do stopniowania przymiotników (np. mia frato pli bone kantas ol mi mój brat lepiej śpiewa niż ja).

8) Przyimki (de, al, per, kun i t. d.) rządzą wszystkie przypadkiem pierwszym.

c) Prawidła ogólne.

9) Każdy wyraz czyta się tak jak się pisze.

10) Akcent pada zawsze na przedostatnią zgłoszkę.

11) Wyrazy złożone tworzą się przez proste połączenie wyrazów (główny na końcu). Końcówki gramatycznie uważane są za wyrazy samoistne (np. vaporsipo parostatek — z vapor' para, ŝip' okręt, o końcówka rzeczownika).

12) Przy innym przeczącym wyrazie opuszcza się przysłówek przeczący ne (np. mi neniam vidis — nigdy nie widziałem).

13) Na pytanie do kąd wyrazy przybierają końcówkę biernika, np. tie tam (w tamtym miejscu), tien tam (do tamtego miejsca) Varsovio do Warszawy.

14) Każdy przymiekn ma określone, stałe znaczenie; jeżeli należy użyć przyimka w wypadkach, gdzie wybór jego nie wypływa z natury rzeczy, używany bywa przyimek je, który nie ma samo-

POLA ESPERANTISTO

Monata Gazeto por propagando de Esperanto



ESPERANTYSTA POLSKI



Miesięcznik poświęcony sprawie Języka Międzynarodowego

Aprilo 1912

WARSZAWA—VARSOVIO.

Jaro VII — Nro 4 (61)

Albumo de la Kongresanoj.

La escepte solena karaktero de la Oka Kongreso postulas, ke ĝi havigu al la partoprenintoj daŭran memorajon. Pro tio la Komitato decidis donaci al ĉiu kongresano artan, bronzan medalon.

Nun montriĝis necesa nova aranĝo, kies mankon oni kun bedaŭro sentis ĉe la ĝisnunaj kongresoj. Ni celas albumon de la kongresanoj.

S-ro Gargul, profesia fotografisto kaj samtempe fervora esperantisto prenis sur sin la taskon realigi projekton de la Komitato, koncerne la eldonon de kongresa albumo. La albumo estos eldonita nur tiam, se almenaŭ 500 kongresanoj ĝin mendos, sed ĝi enhavas portretojn de ĉiuj kongresanoj senescepte. La bildoj, kiuj estos faritaj laŭ fotoĥemia procedo sekve laŭ procedo sole garantianta tre precizajn reproduktajn, estos aranĝitaj tiamaniere, ke

ĉiumomente oni povos trovi en la albumo portreton de kongresano, kiun oni konas laŭ lia nomo, aŭ inverse, nomon kaj adreson de kongresano, kiun oni konas laŭ lia aspekto.

Estas nepre necese donaci al nia Majstro albumon de samideanoj, venintaj al la Kongreso el ĉiuj mondpartoj, por honori Lin kaj Lian grandan verkon. Tion ĉiu kongresano devas kompreni kaj atenti.

Pro tio ni turnas nin al ĉiuj aliĝintoj kaj aliĝontoj, ke ili sendu al ni sian fotografajon nepre en vizit-formato, bone faritan.

Tiuj kongresanoj, kiuj intencas aĉeti la albumon—kaj ni firme esperas, ke neniu domaĝos por tiu ĉi celo kelkajn spemilojn — sendante sian portreton, mendu samtempe la albumon, aldonante antaŭpagon de Sm. 2.

Se 500 personoj mendos la albumon, ĝia prezo estos Sm. 5. Ju pli multaj kongresanoj mendos la albumon, des pli malalta estos ĝia prezo.

Ni firme fidas la solidarecon de la kongresanoj kaj petas: Aliĝintoj kaj aliĝontoj sendu senprokraste Vian fotografajon kaj mendu la albumon.

Loka Organiza Komitato.



D-ro Leono Rosenstock
Ĝenerala Sekretario de la Oka.

Por ke la simpatia entrepreno sukcesu, ĉiu kongresanto sendu sian fotografajon tuj, ĉar la preparo postulas multe da tempo.

Kongres esperantystów w Krakowie.

Coraz żywiej zajmuje uwagę ogółu naszego wszechświatowy kongres esperantystów, który w dniach 11—18 sierpnia odbędzie się w Krakowie. Dla starej stolicy Polski i dla całego naszego kraju będzie on miał niemałe znaczenie. Aby znaczenie to zrozumieć, wystarczy powiedzieć, że w kongresie weźmie udział przeszło 2000 cudzoziemców, reprezentujących kilkadziesiąt różnych narodowości. Ruch esperancki krzewi się przeważnie wśród warstw wykształconych, zatem ci goście stanowiąc będą niejako elitę swoich społeczeństw. Dzięki zjazdowi będą oni mieli sposobność poznać trochę Polskę, zbliżyć się bezpośrednio do naszej kultury, przekonać się, że chociaż niema nas na politycznej karcie Europy, stanowimy przecież żywą i czynną częśćkę cywilizowanego świata. Bardzo szczęśliwie złożyło się, że kongres tegoroczny jest kongresem jubileuszowym 25-lecia Esperanta, zjazd w Krakowie będzie zatem liczniejszy, niż gdziekolwiek.

W głównych zarysach ustalony już został program całotygodniowych obrad, które zainaugurowane będą uroczystym wieczorem jubileuszowym języka Esperanto. Przez cały czas trwania kongresu będzie otwarta wystawa, uzmysławiająca rozwój tego języka w ciągu lat 25. W programie znajduje się oczywiście także zwiedzanie zabytków Krakowa, jego muzeów i wystaw. W Pałacu Sztuki urządzona będzie wielka wystawa współczesnej sztuki polskiej, umyślnie dla zaznajomienia z nią cudzoziemców. Stary Kraków, ze swymi wspaniałymi pomnikami przeszłości królewskiej, i nowy Kraków, ze swym wartkim prądem życia kulturalnego, staną się w ciągu tych kilkunastu dni nieocenionymi informatorami zagranicy o naszej przeszłości i teraźniejszości. Komitet przygotowawczy pomyślał i o tem, aby na wyobraźnię cudzoziemców oddziałać także barwnymi, dekoracyjnymi stronami polskiego życia, które na swój sposób podkreślą naszą narodową indywidualność. Na Wiśle pod Wawelem urządzona będzie prześliczna uroczystość wianków—zaprodukuje się pieśń polska. Na wspaniałym Rynku naszym przedstawi się uczestnikom niezrównanie ma-

lownicze „wesele krakowskie“, jak przed trzydziestu laty za pobytu cesarza Franciszka Józefa. Uczestnicy kongresu pojedą do Wieliczki, do Tatr i do romantycznie pięknych Pienin—poznają cuda naszej przyrody. Wszystko to może mieć niemałe znaczenie dla rozwoju turystyki w naszym kraju. Jednym z punktów programu będzie złożenie hołdu kongresu przed pomnikiem Mickiewicza i hołd profesorów obcych uniwersytetów przed pomnikiem Kopernika w dziedzińcu Biblioteki Jagiellońskiej.

Kraków uczy się żwawo po esperancku, aby sprostać praktycznemu zadaniu przyjęcia tyłu obcych gości; a język ten rozlegnie się także w teatrze miejskim gdzie będzie dany „Mazepa“, co więcej: w kościele. Niezrozumiałe mi są dla nas skrupuły tych publicystów warszawskich, którzy się obawiają sprofanowania poezji Słowackiego sztucznym językiem. Sprawę tę chyba rozstrzygnie dostatecznie powaga jednego z najczcigodniejszych książy naszego kościoła, ks. biskupa Bandurskiego, który w murach starej świątyni Marjackiej wygłosi w tym sztucznym języku kazanie do uczestników kongresu. Kościół więc w swym majestacie dwóch tysięcy lat nie żywi wobec słowa Bożego tych skrupułów niewczesnych, jakie owi publicyści żywią wobec tęczy strof poezji, przełożonych na dzwięcny język przyszłości.

Kongres krakowski budzi u nas najwyższe sympatje, a budzi je nie tylko dlatego, że stawia nas w rzadkiej roli gospodarzy wobec cywilizowanego zachodu i stwarza sposobność zapoznania tego zachodu z naszym życiem i naszymi zasobami kulturalnymi. Sympatje budzi zjazd esperantystów na ziemi polskiej także i dlatego, że jest on wyrazem ruchu, który ludzi różnych plemion nie dzieli, lecz jednoczy, który wśród szalu nacjonalistycznego naszych czasów usiłuje wnieść do życia powszechnego idealną nutę braterstwa. Jeśli kto, to my chyba mamy powód aby wdzięcznem sercem powitać tysięczne zastępy, które w imię tego hasła przybędą w mury naszej starej stolicy.

(„Słowo“)

Nawój.

En 1912 jaro „POLA ESPERANTISTO“ aperadas regule ĉiumonate en iom pligrand-
igita amplekso kun ilustraĵoj. La programo estas plivastigita kaj plidiversigita.

JARA ABONPAGO: frankite r.b. 2.50 = 2.65 kun „LITERATURA ALDONO“.

Adreso: WARSZAWA, la Redakcio — Włodzimierska 8, la Administracio — Hoza 20.

BOLESŁAW PRUS.

Peĵoj de 1' infaneco.

(Daŭrigo).

Ĉiufoje, kiam mi estis fermita en karcero, la ĝibuleto alportis al mi kaŝe panon kaj vian-
don el sia tagmanĝo. Kaj se mi havis ian pli-
grandan malagrablon, tiam, kun larmoj en oku-
loj, li certigadis la kolegojn, ke mi toleros nen-
ian al mi farotan maljustaĵon.

— Ho! ho!—li diris—Kazjo estas forta. Se
li kaptos la pedelon je la ŝultroj, li jetos lin
teren kiel plumon. Ne timu!

Efektive, miaj kolegoj ne timis, sed li, mi-
zerulo, timis por ni ambaŭ.

Se la ĝibuleto ne bezonis atentigi dum in-
leciono, tiam li diris al mi komplimentojn:

— Mia Dio... se mi estus tiel forta, kiel vi!..
Mia Dio!.. se mi estus tiel kapabla... Sciu, ke
se vi nur volus, post monato vi fariĝus la unua
lernanto...

Iutage, tute
surprize, la in-
struisto de ling-
vo germana al-
vokis min al la
katedro. La ter-
rurita Juzjo ha-
vis apenaŭ la
tempon suflori
al mi, ke: al la
kvara deklinacio
apartenas ĉiuj
substantivoj
virinseksaj,
ekzemple: *die
Frau*—la sinjo-
rino...

Mi eliris per
firma paŝo kaj
kun granda
certeco mi sciigis la instruiston, ke al la kvara
deklinacio apartenas ĉiuj substantivoj virin-
seksaj, ekzemple: *die Fräulein*—la sinjorino... Sed
ĉe tio finiĝis mia sciado.

La profesoro ekrigardis en miajn okulojn,
balancis la kapon kaj ordonis traduki. Mi tra-
legis germane flue kaj laŭte unu fojon, poste
ankoraŭ pli flue—duan fojon, sed kiam mi ko-
mencis triafoje legi la saman fragmenton, la
instruisto ordonis al mi reiri sur mian lokon.

Revenante al mia benko, mi ekvidis, ke
Juzjo tre atente rigardas la kraĵonon de la
profesoro kaj ke li havas tre ĉagrenigitan
mienon.

Instinkte mi demandis la ĝibuleton:

— Ĉu vi ne scias, kian gradon li donis al mi?

— Ĉu mi povas scii?...—ekspiris Juzjo.

— Sed kio ŝajnas al vi?

— Mi—diris la ĝibuleto—donus al vi kvin-
on, nu—cetere kvaron, sed li...

— Kaj li, kiom li donis al mi?... — mi de-
mandis.

— Ŝajnas al mi, ke — unuon... Sed tiu-ĉi
azeno, kion li scias!.. respondis Juzjo, per
voĉo, en kiu sonis profunda konvinko.

Malgraŭ sia malfortikeco, la knabeto estis
tre laborema kaj kapabla. Mi legis kutime en
la klaso romanojn, kaj li aŭskultis la prelegon
kaj poste li ripetis ĝin al mi.

Foje mi demandis lin, pri kio parolis nia
instruisto de zoologio?

— Jen, pri
tio — respondis
la ĝibuleto kun
mistera mieno,
ke la kreskajoj
estas similaj al
bestoj.

— Malsaĝa
li estas—mi re-
spondis.

— Tamen!—
diris la ĝibule-
to—li estas pra-
va. Mi jam kom-
prenas lin iome-
mete.

Mi komencis
ridi kaj mi diris:

— Nu, se vi
estas tiel saĝa,

do diru al mi: per kio similas la saliko al la
bovino?

La knabo enpensiĝis kaj komencis paroli
malrapide:

— Rigardu — la bovino kreskas, kaj la sa-
liko ankaŭ kreskas...

— Kaj kio plu?,

— La bovino nutras sin, kaj la saliko nutras
sin per la sukaj el la tero...

— Kaj kio plu?..

La bovino estas virinseksa, nu—kaj la sa-
liko*) estas ankaŭ virinseksa — klarigis Juzjo.

— Sed la bovino svingas la voston—diris mi.

*) En lingvo pola.



Krakovo. Domo de la Societo de amikoj
de belaj artoj.

— Kaj la saliko svingas la branĉojn — re-diris li.

Tia sumo da argumentoj malfortigis mian kredon je la ekzisto de diferenco inter bestoj kaj kreskadoj. La opinio mem plaĉis al mi, kaj de post tiu tempo vekigis en mi la amo al la zoologio, resumita en la libro de Pisulewski. Dank' al la argumentoj de la ĝibuleto, mi komencis el tiu-ĉi objekto ricevi kvinojn.

Iun tagon Juzjo ne venis en la lernejon, kaj la sekvantan tagon antaŭ tagmezo oni diris al mi, ke iu frapas por elvoki min el la klaso. Mi ekuris sur la koridoron malkvieta, kiel kutime en similaj okazoj, sed, anstataŭ la inspektoron, mi ekvidis korpulentan viron kun helruĝa vizaĝo, violkolora nazo kaj ruĝaj okuloj.

La nekonato ekparolis per voĉo iom raŭka:

— Vi, knabo, estas Leśniewski?

— Mi.

Li faris duonpaŝon, kvazaŭ ŝanceliĝante, kaj li aldonis:

— Vizitu mian filon, Juzjon, tiun ĝibhavan, vi scias? Li estas malsana, ĉar antaŭhieraŭ oni surlin iom surveturis...

Li ree ŝanceliĝis, ekrigardis min per siaj vagaj okuloj kaj foriris, piedfrapante laŭte la plankon. Mi eksentis, kvazaŭ iu verŝus sur min bolantan akvon. Ŝajnis al mi, ke mi pli ĝuste devus esti surveturita, sed ne tiu-ĉi kompatinda ĝibuleto, li — tiel bona kaj malfortika.

Posttagmeze okazis libertempo... Mi ne iris jam hejmen tagmanĝi, sed mi kuris rekte al Juzjo.

Li loĝis kun sia patro ĉe fino de la urbo, en du ĉambretoj de teretaĝa domo. Kiam mi eniris, mi ekvidis la ĝibuleton kuŝantan sur mallonga liteto. Li estis sola, tute sola. Li spiris malfacile kaj tremis de malvarmo, ĉar la forno ne estis hejtita. Liaj pupiloj tiel va-

stigiĝis, ke li havis preskaŭ nigrajn okulojn. En la ĉambreto estis sentebla humideco, kaj el la tegmento falis gutoj de degelanta glacio.

Mi kliniĝis super la lito kaj demandis:

-- Kio okazis al vi, Juzjo?

Li vigliĝis iom, malfermis la buŝon, kvazaŭ por rideto, sed — li nur ekĝemis. Li prenis mian manon per siaj sekiĝintaj manetoj kaj komencis paroli:

— Mi verŝajne mortos... Sed mi timas tiel... sola... do mi petis, ke vi venu... Tio... daŭros... ne longe, kaj al mi estos iom pli gaje...

Ankoraŭ neniam Juzjo ŝajnis al mi tia, kiel hodiaŭ. Ŝajnis al mi, ke el kriplulo fariĝas grandegulo.

Li komencis obtuze ĝemi kaj tusi, ĝis el

lia buŝo eliĝis rozkolora ŝaŭmo. Poste li fermis la okulojn kaj spiris malfacile, kaj de tempo al tempo li tute ne spiris. Se mi ne sentus la premon de liaj varmegaj manetoj, mi opinius, ke li mortis.

Tiel ni sidis unu, du, tri horojn — silentante.

Mi preskaŭ perdis la


kapablecon pensi; Juzjo ekparolis malofte kaj kun granda peno. Li diris al mi, ke sur lin surveturis de malantaŭe ia veturigilo, ke lin ekdoloris terure la spino, sed ĝi jam ne doloras, ke la patro forpelis hieraŭ la servistinojn, kaj hodiaŭ li foriris serĉi alian...

Poste, ne liberigante mian manon, li petis ke mi diru la tutan preĝareton. Mi diris ĝin, kaj kiam mi komencis: „Kiam matenruĝo brilas“**, li interrompis min:

— Diru ankaŭ — „Tutan nian taglaboron“...*) Mi morgaŭ jam verŝajne ne vekigos...

La suno subiris, fariĝis ia griza nokto, ĉar

*) preĝokanto matena, **) preĝokanto vespera.



Krakovo. Malnovaj konstruaĵoj ĉe la ring-gardeno „Planty“.

malantaŭ la nuboj lumis la luno. En la domo malestis kandelo, cetere mi eĉ ne intencis ĝin ekbruligi. Juzjo estis ĉiam pli maltrankvila, li deliris kaj nur momente li rekonsciigis.

Estis jam malfrue, kiam el flanko de la strato ekfrapis bruege la pordeto. Iu trairis la korton, kaj, fajfante malfermis la pordon de nia ĉambro.

— La paĉjo?—ekĝemis la ĝibuleto.

Jes, mia filo! — respondis la alveninto per raŭka voĉo.—Kiel vi fartas? Certe pli bone!.. Tiel devas esti!.. Ĉiam kuraĝe, mia filo...

— Paĉjo... mankas lumo...—parolis Juzjo.

— Malsaĝa—lumo!.. Jen kiu estas?... li ekvokis, faletante ĉe mi.

— Estas mi...—mi rediris.

— Ha! Lukasedzino? bone!.. Dormu hodiaŭ, kaj morgaŭ—vi ricevos de mi balojn... Mi estas guberniestro!.. Rum' jamajka!..

— Bonan nokton, paĉjo!.. bonan nokton!.. flustris Juzjo.

— Bonan nokton, bonan nokton, mia infano!.. rediris la al-

veninto, kaj—kliniĝinte super la lito — li kisis mian kapon. Mi sentis, ke sub la brako li havis botelon.

— Dormu bone, li aldonis — kaj morgaŭ marŝu en la lernejon!.. Paŝe maarr!.. Rum jamajka!.. li ekkriis kaj foriris en la alian ĉambron.

Tie li peze sidiĝis, kredeble sur kofron, li ekbatis per kapo la muron, kaj post momento — aŭdiĝis temp-mezura bul-bul-bul-sono, kvazaŭ iu trinkus.

— Kazjo!.. — flustris la ĝibuleto — kiam mi estos jam... *tie*... venu al mi de tempo al tempo. Vi diros al mi, kian taskon oni donis en la lernejo...

En la alia ĉambro ekkriis la alveninto:

— Sanon ni deziras al la sinjoro guberniestro!.. Vivu!.. Mi estas guberniestro!.. Rum jamajka!..

Juzjo komencis skuiĝi kaj paroli ĉiam pli maltrankvile:

— Tiel doloras min la sakro!.. Ĉu vi ne sidiĝis sur min, Kazjo? Kazjo!.. Ho, jam ne baltu min plu!..

— Rum!.. Rum jamajka!.. oni kriis en la alia ĉambro. Ree aŭdiĝis bulbulado, kaj poste — la botelo kun terura tinto ekbatis la plankon.

Juzjo altiris mian manon al sia buŝo, kaptis per dentoj la fingrojn kaj—subite li ilin ellasis. Li jam ne spiris.

— Sinjoro! — mi vokis. — Sinjoro! Juzjo mortis!..

— Kion vi babilas?—ekmurmuris voĉo en la alia ĉambro.

Mi saltis el la lito kaj stariĝis en la pordo, rigardante en la mallumon.

— Juzjo mortis!.. ripetis mi tute tremante.

La homo brue moviĝis sur la kofro kaj ekkriis:

— Foriĝu el ĉi-tie, vi

malsaĝulo!.. Mi, lia patro, scias pli bone, ĉu li mortis!.. Vivu la sinjoro guberniestro!.. Rum jamajka!..

Mi terure ektimis kaj forkuris.

Dum la tuta nokto mi ne povis dormi, mi frostetremis kaj iaj sonĝaj vidaĵoj min turmentis. Matene pririgardis min la mastro de nia pensiono kaj li diris, ke mi havas febron, ke mi verŝajne infektis min de la surveturita Juzjo kaj — li ordonis starigi sur mian sakron dekdu tranĉkupojn. Post apliko de tiu-ĉi kuracilo sekvis, kiel diris la mastro, tia krizo, ke mi dum tuta semajno kuŝis en lito.

Mi ne ĉeestis la enterigon de Juzjo, kiun akompanis nia tuta klaso kun la instruistoj kaj la pastro-prefekto. Oni diris al mi, ke li havis



Krakovo. Fragmento de Ring-ĝardeno „Planty“.

nigran veluran ĉerkon, tiel malgrandan kiel violonkesteto.

La patro ploris terure, kaj sur la tombejo li kaptis la ĉerkon kaj volis forkuri kun ĝi. Sed malgraŭ tio oni Juzjon enterigis, kaj lian patron la komisario kun policisto forkondukis el la tombejo.

Kiam unuafoje mi ree venis en la lernejon, oni diris al mi, ke iu homo ĉiutage demandas pri mi. Kaj efektive je la dekunua horo mi estis elvokita.

Mi eliris — malantaŭ la pordo staris la patro de la mortinta Juzjo. Li havis vizaĝon helviolkoran kaj la nazon cindrogrizan. Li estis tute sobra, nur lia kapo kaj liaj manoj tremis.

Tiu-ĉi homo prenis min je la mentono kaj longe li rigardis atente en miajn okulojn, kaj poste li diris subite:

— Vi defendis Juzjon kiam oni lin turmentis en la klaso?..

— Ĉu tiu ĉi maljunulo frenezigiĝis? — mi ekpensis, sed mi respondis [al li nenion.

Li ĉirkaŭprenis per manoj mian kolon kaj kis-sis kelkfoje mian kapon, murmuretante:

— Dio vin benu... Dio vin benu!..

Li ellasis mian kapon kaj demandis refoje:

— Vi estis ĉe lia morto?.. Diru al mi la veron, ĉu li tre suferis?

Subite li repaŝis kaj diris rapide:

— Aŭ nenion... diru jam nenion al mi!.. Ho, neniŭ scias, kiel mi estas malfeliĉa!..

El liaj okuloj komencis flui larmoj. Li kaptis ambaŭmane sian kapon deturnis sin de mi kaj kuris al la ŝtuparo, kriante:

— Malfeliĉa mi!.. mizera... mizera!..

Li kriis tiel laŭte, ke sur la korldoron eliris la profesoroj. Ili rigardis lin, balancis la kapojn kaj ordonis, ke mi reiru en la klason.

Vespere iu makleristo alportis en la pensionon sufiĉe grandan kofron por mi, kaj karteton kun nur tiu-ĉi surskribo:

„De la malfeliĉa Juzjo—memorajo“.

En la kofro estis multo da belaj libroj, post la mortinta Juzjo, kaj inter aliaj: Libro de la mondo, Historio de Cezaro Cantu, Don Quichot, Drezdena Galerio kaj multaj aliaj. Tiuj ĉi libroj vekis en mi pasian deziron al pli serioza legado.

Estis jam printempo, kiam mi unuafoje ekiris sur la tombon de Juzjo. Ĝi estis tiel malgranda kaj ĝibigita, kiel li mem. Mi ekvidis, ke iu ĉirkaŭplantis ĝin per verdaj branĉetoj. Kelke da paŝoj pli malproksime, inter la herbo, mi trovis kelke da boteloj kun la surskribo: *Rum Jamaica*. Mi sidis ĉirkaŭ unu horon, sed mi ne diris al Juzjo, kian taskon ni ricevis por la leciono, ĉar mi mem ne sciis, kaj li tion ne demandis.

Post semajno mi ree iris sur la tombejon.

Ree mi ekvidis branĉetojn, freŝe fiksitajn en la tombon de Juzjo, kaj inter la herbo — ree mi trovis kelke da tutaj kaj ekrompitaj boteloj.

En komenco de la monato Majo disvastiĝis en la urbo neordinara novaĵo. Jen



Krakovo. Akademio de belaj artoj.

matene, ĉe la tombo de Juzjo, oni trovis la malvivan korpon de lia patro. Apud ĝi kuŝis duone malplenigita botelo kun la surskribo: *Rum Jamaica*.

La kuracisto diris, ke tiu homo mortis je anevrismo.

Tiuj okazintaĵoj reagis sur min strangamaniere. De post tiu tempo la societo de miaj kolegoj fariĝis peza por mi, kaj iliaj kriemaj amuzoj enuigis min. Tiam mi enprofundiĝis en la legadon de la libroj, kiujn al mi postlasis Juzjo, aŭ mi sekrete kuris malantaŭ la urbon, en la kavojn kovritajn per arbustaro, kaj vagante tie, mi meditis—Dio mem scias—pri kio Ofte mi demandis min, kial Juzjo pereis tiel mizere, kaj kial lia patro estis tiel soleca, ke li eĉ devis premi sin karese al la tombode la filo? (Daŭrigo sekvos)

Tr. A. Grabowski

EL CIKLO „AL SUNO“.

Dedicita al S-ro WŁODZIMIERZ PFEIFFER

Kiam suno levigas.

*Kiam suno levigas,
Horizonto per blua
Vualigas
Krepusko matena,
Tiam tuta naturo,
En tagigo la frua,
Per murmuro
Salutas ĝin bona.*

*Novaj pensoj kaj kantoj,
Disportataj tra l' tero,
Disŝirantoj
De mondaj la muskoj,
La ekvokoj junulaj
Pri la nova espero —
El nebulaj
Eligas krepuskoj.*

*El ĉi-iumo benua,
Kun la ard' en okulo,
Novvekita
Ekmarŝas anaro:
For mallumo senpova!
Mond' en sia temprulo
Kun la nova
Ekpaŝas homaro.*

*Kiam suno levigas,
Horizonto per blujaj
Vualigas
Kurtenoj ĉielaj,
Kun radioj fluantaj
Mondon venas fortskuaj
Kaj venkkantaj
Ideoj ribelaj.*

*Kaj kun lumo kreskanta,
Kun kreskanta la tago—
Esperanta
Alvoko aŭdigas:
Hej, tagigol ekstaru!
Al labor' — al la ago!
Ĉiam faru —
Estont' distlumigas!..*

*Kiam suno levigas,
Horizonto per blua
Vualigas
Krepuska mateno —
En la brust' mia juna
Dum tagigo ĉi-frua
Flamas suna
Espera soleno.*

Kiam suno subigas.

*Kiam suno subigas,
Horizonto per sanga
Vualigas
Reĝvesta purpuro,
la Forto mistera
Kun krakego lavanga
Post la tera
Enfalas limmuro.*

*Pasis tago labora —
De rikolto momento.
Rememora
Ekscito alfluas:
Ho, en tiu majesto
Tombo de la homsento —
Al neesto
Pasinto forfluas.*

*Sed jen suno al dormo
Jam kusigis lacita,
Nun la formo
Malnova sen loko,
En ripoza nur paco
Dronas roze orita
Reĝ-palaco —
Pasinta epoko.*

*Kiam suno subigas,
Horizonto per klaraj
Vualigas
Nebulaj ĉifonoj
Kaj ekregas la paco
Sur ebenaĵoj kamparaj —
Mondpalaco
En brilaj reĝkronoj.*

*Estis bela la tago,
Plena de la korgojoj
Kaj imago
Laboris de homo,
Por konduki homaron
Tra la novaj vivvojoj,
Sub arkaron
De sorĉa la domo.*

*Kiam suno subigas,
Horizonto purpura
Vualigas
Per sanga ruĝoro —
Restos mi esperplena:
Al zenito lazura
Pri revena
Mi kantos aŭroro.*

Wiktór Elski.

Ukraina popolkanto.

*„Kazut lude, szczom szczastlywa,
Ja z toho smiejusia,
Bo ne znajut, jak ja czasto
Slozami zaljusia!“*

*Neszczastlywa rodytasia,
Neszczastlywa zhyngu;
Czom ty rodyła mne maty
W takoju hodyngu“.*

*Homoj nomas min feliĉa —
Mi pro tio ridas,
Ĉar kaŝitan mian ploron
Ili ja ne vidas!*

*Malfeliĉa de naskigo
Restos mi ĝis morto;
Kial naskis vi, patrino,
Min por tia sorto!*

Esp. A. Grabowski.

Ni sekvu la ekzemplon de nia Majstro.

Antaŭ nelonga tempo ni provis en la artikolo: „Ĉu esperantistoj estas fidelaj al esperantismo“ — klarigi la situacion de esperantistoj rilate al principoj, sur kiujn apogas sin nia tuta movado. Hodiaŭ, sekve de multaj ne ĝojigaj okazintaĵoj en esperantistaro, precipe inter niaj estroj, ni volas sincere pritrakti, kien tiaj okazintaĵoj kondukas nin, simplajn esperantistajn soldatojn.

Sed ĉu simpla soldato havas rajton preparoli la sintenadon de siaj oficiroj?

Nu, kiu nur iomete studis la mondhistorion, konvinkigis, ke preskaŭ ĉiam nur tiuj armeoj venkis, en kiuj soldatoj kaj oficiroj reciproke sin komprenis, rilate al sia tasko, kiel ankaŭ rilate al sia animo.

Cetere ni, Esperanto-soldatoj estas nek dungitaj nek devigataj al nia servo. Ni estas liberaj viroj kaj virinoj, kiuj el plej profunda konvinko de spirito kaj koro volas propravole batali kaj oferojn alporti por afero, kiu al ni ŝajnas la plej inda je penoj de nuntempa kultura homo.

De tio nia rajto alparoli en la nomo de la esperantistaro vin, esperantistajn oficirojn aŭ vin, kiuj volas tiaj fariĝi.

Esperanta movado estas, kiel ĉiu granda spirita movado, nature demokrata, tio signifas ĝi estas destinata enpenetri en la amasojn de popoloj; nur tiam ĝi havigos al si sufiĉan potencon, nur tiam ĝi venkos. Sed aliflanke montras al ni la mondhistorio, ke demokrataj kreitaĵoj, ĉu regnoj, ĉu respublikoj, kiuj ja nature ne posedas monarĥian aŭtokratecon povas nur tiam ekzisti kaj kontraŭstari siajn malamikojn, kiam la tutajn, tio estas la gvidantojn kaj gvidatojn, kunigas senpere reganta ideo, kiu antaŭ ĉio ne permesas al la gvidantoj deflankiĝi. Nu, en bone ordigitaj ŝtatoj

oni faras ĉefojn — homojn, kiuj pruvis siajn spiritajn kapablecojn en multaj ekzamenoj kaj en praktikaj oficfunkcioj. Kiu aŭ kio donis aŭ donos al niaj esperantaj eminentuloj patentojn esti niaj oficiroj, niaj spiritaj gvidantoj? Ĉu kiajn ecojn ili devis posedi? Kiajn devojn kaj rajtojn la esperantistaro por ili fiksis?

Ni provu respondi. La servo por esperanta afero estas ĝis nun servo de oferoj, ni aldonu, de grandaj oferoj; oni devas fordoni tempon, laboron, monon, elteni nekomprenon, mokon, persekuton kaj tamen — stari fortaj decidaj, virmaniere fieraj. Pro tio unua eco de nia esperanta oficiro devas esti — oferemeco.

Poste, kio estas nepre memkomprenebla, li devas posedi tute klaran komprenon de la celoj, de la iloj kaj de la stato de esperanta movado, tio estas, komprenon de esperanta lingvo kaj de esperantismo.

Trie, li devas havi eblecon por agi por la esperanta afero kaj fortan volon fari tion.

Kvare, li devas havi spiritan kapablecon por orienti sin science kaj sociale en la afero. Se samtempe tiu Esperanto-oficiro okupas en ŝtata aŭ socia vivo influan lokon, des pli bone por la esperanta afero, sed kompreneble nur tiam, se li scias sian socian pozicion bone eluzi, ne ofendante la socie malpli alte starigitajn.

Nu, virojn, kiuj posedas supre cititajn ecojn, ni, Esperanto-soldatoj, ĉiam altestimos kaj per ĉiuj niaj fortoj helpos, por ke ili nin gvidu al la lasta sopiregata celo.

Sed kion ni nun vidas?

La vortoj, kiujn ni estas devigataj ĉi-tie aŭdigi, ne koncernas nur esperantajn estrojn polajn aŭ germanajn aŭ francajn k. t. p. Be-daŭinde la ĉi-tie preparolata minaca cirkon-



Krakovo. Nova Jagelona Universitato.

stanco lastatempe vidiĝas inter la esperanta estraro de multaj landoj kaj malhelpas multege nian movadon.

Ni, Esperanto-soldatoj, ne volas revolucii, ni ne intencas enporti novan konfuzon, novan interfratan bataladon en viajn estrajn vicojn per niaj vortoj. Ni volas vin nur atentigi, ke tia stato ne povas pli longe daŭri sen grandega malutlilo, eĉ eble baldaŭna pereco de nia granda kaj nobla afero. Tial pardonu al ni, se niaj subaj vortoj unuarigarde al vi ŝajnos esti iom akraj; ili ankaŭ ne koncernas tiujn de niaj gvidantoj, kiuj ĝis nun sen ia persona celo alte tenis nian puran, verdan, standardon.

Sed ne ĉie kaj ne ĉiam havas nia verda steleto bonajn zorgantojn. Privataj celoj, personaj demandoj kaj interesoj enŝteligiĝas en multajn cerbojn (ni esperu, ne korojn) de nia estraro. Ne la utilo por la komuna afero decidas oftege la agadon, sed la rolo, kiun la aganto esperas ludi en pli aŭ malpli vastaj esperantistaj rondoj aŭ societoj. Homoj, kiuj, ŝvingas la verdan standardon kun la surskribo: „Por alta homara ideo“ fariĝas pigmeoj kaj sklavoĵoj de siaj propraj, personaj ambicioj. Agante, ili ne demandas, ĉu tiu-ĉi aŭ tiu faro alportos utilon al nia komuna, sankta afero, ili pripensas, kiun honoron, kiun influon, kiun personan potencon ili rikoltos tiuokaze. Komuna, publika intereso cedas al la privata

utilo kaj tio estas des pli stranga, ke ĝi okazas per interbatalado de samlandanoj, kiuj volas aŭ devus voli kunfratigi la popolojn.

Kiel malbela, kiel hontiga aspekto por nia tuta esperantistaro, por ni, Esperanto-soldatoj, kiuj propravole envicigis nin, esperante batali nur por nobla homara ideo.

Ĉu niaj malamikoj ne havas rajton ironie rideti pri niaj homfeliĉigantaj intencoj, pri niaj utopiaj celoj, pri nia — malprudenta ago?!

Ĉu vi, estroj, ne vidas, kie staras niaj malamikoj?! Tien vi nin gvidu, tie ni volas pruvi niajn fortojn, nian oferecon, nian viran kuragon!

Sed ne gvidu nin kontraŭ tiu-ĉi aŭ tiu-ĉi por vi malagrabla viro, ĉar tien ni ne volas sekvi vin, ni ne sekvos!

Ne volu esti Olimpiaj dioj, ĉar nur la esperanta ideo estas dia kaj vi estas — maljunaj pekuloj (ne kondamu maljunan soldaton pro malrespekto). Faru oferon de via propra, persona sento, se la komuna ofero tion postulas. Tiam ni, Esperanto-soldatoj, entuziasme sekvos vin kaj ekkrios: „Vivu nia estraro, ĝi sekvas la ekzemplon de nia Majstro!“ kaj — la venko sekvos niajn verdajn standardojn!

Dresden.

R. Maske

Opinie wybitnych Francuzów o Esperancie.

P. Nortier, Mer w Nenilly, deputowany Sekwany.

Moje zdaniem rozwój Esperanta ułatwiając różnorodne stosunki międzynarodowe, może wpłynąć dodatnio na dobrobyt społeczny, ponieważ ruch esperancki prowadzi do postępu. może zawsze liczyć na moje poparcie.

P. Mourlot Inspektor Akademii. (Mowa wypowiedziana na konferencji o Esperancie w Bauvois, urządzanej staraniem pp. Demercy i Jana Blik).

„Milo mi jest widzieć salę przepelnioną przedstawicielami ciała profesorskiego i nauczycielskiego. Młodzież, to potęga, która narzuci masom całym język międzynarodowy. Znajomość języka tego jaką im zaszczerpi szkoła, nietylko da im możność zawiązania stosunków z ich młodocianymi towarzyszami, obco-krajowcami, ale pozwoli im lepiej poznać język ojczysty, a tym samym lepiej pracować dla szczęścia i dobrobytu ojczyzny“.

P. Reymond, senator, (słowa wypowiedziane na obiedzie grupy Esperantystów w Paryżu d. 12 Grudnia r. z. na którym p. A. Michelin ofiarował 20,000 fr. na rzecz Esperanta):

„Dotychczas właściwie nie zdawałem sobie sprawy z łączności jaka istnieje między Esperantem a awiatyką; znalazłszy się jednak tutaj i widząc całszereg korzyści dla awiatorów, zrozumiałem istniejący łącznik, na co poprzednio nie zwróciłem najmniejszej uwagi. Jeżeli pokładałem zawsze wielkie nadzieje w awjacji, to tylko dlatego, że uważam ją za sposób przebycia wszelkich przestrzeni i zjednoczenia całej ludzkości. Ci co fruują na białych, wielkich ptakach, muszą znać jeden wspólny język. Trzeba, aby przy wylądowaniu w nieznanych miejscowościach, można było posługiwać się językiem zrozumiałym dla wszystkich. Tym językiem jest Esperanto, więc piję za jego rozwój i powodzenie“.

IV-a Cirkulero (Oficiale komunikita).

Oka Universala Kongreso Esperantista.

11 — 18 aŭgusto 1912.

La Krakova loĝantaro tre simpatie rilatas al la Oka, kion interalie pravas la fakto, ke multaj influriciĝaj personoj aliĝis al la Kongresa Komitato, subtenante la klopodojn de la organizantaro per sia valora kunhelpo.

Al la Komitato apartenas interalie 8 urbaj konsilantoj, el kiuj precipe citindaj estas: D-ro L. Schneider, prezidanto de la Turista Ligo; D-ro M. Starzewski, fervoja ĉefinspektoro; S-o J. Judkiewicz, prezidanto de la grenborso, k. a.

Pri la Kongreso ekinteresiĝis la Krakova Komerca Ĉambro, kies vic-sekretario D-ro R. Beres, estas agema ano de la Komitato kaj samtempe fervora esperantisto. Dank' al aliaj klopodoj la Ĉambro oficiale organizis kurson de Esperanto

kaj promesis doni monhelpon al la Organiza Komitato.

Nuntempe okazas en nia urbo 17 kursoj kaj nome: por poŝtoficistoj, fervoraj oficistoj, konduktoroj, komercistoj, policanoj, akademiuloj, mezlernejaj studentoj, aktoroj k. t. p.

Baldaŭ estos organizita kurso por lernantoj de la Industria lernejo.

Specialan dankon meritas la Krakova ĵurnalisto, kiu tre favoras la Kongreson, publikigante ofte ne nur notojn kaj komunikajojn, sed ankaŭ pli grandajn artikolojn pri nia afero. Al la Komitato apartenas ankaŭ kelkaj ĵurnalistoj k. e. S-o Grzywiński, S-o Raczkowski, S-ro Sokołowski k. a., kiuj kun vera ofereco laboras por certigi al la Kongreso sukceson kaj agrabliĝi al la fremdaj gastoj la restadon en nia urbo.

La Organiza Komitato eldonis tre belan poŝtkarton kaj sigelmarkon, faritajn de fama

pentristoj: S-o Eugeniusz Kazimirowski kaj D-ro Stanisław Elias Radzikowski.

Por la Kongresa karto Nr. 1, kiu estas aŭkcie vendota, unu konata angla samideano proponas jam la duoblon de la ordinara prezo t. e. 12 Sm. Espereble inter la polaj esperantistoj troviĝos ankaŭ „aŭkciantoj“.

Pri albumo de la Kongresanoj, la legantoj trovos specialan artikoleton sur la unua paĝo de ĉi tiu numero. La koncerna projekto nepre meritas esti realigita. Ĉar la realigo dependas sole de bonvolemo kaj solidareco de la kongresanoj, la Organiza Komitato ne dubas, ke ĝia plano sukcesos.


Dum la antaŭaj kongresoj okazadis diservoj ne nur por katolikoj, sed ankaŭ por protestantoj.

Same estos dum la Oka Kongreso, kies Komitato gajnis pastron Karol Michejda, estron de la Krakova protestanta komunumo, kiu por la protestantaj kongresanoj faros specialan diservon kun esperanta prediko.

Profesoroj

de Krakova Muzika Konservatorio: Drozdowski, Barabasz, Kalinowski kaj Walewski organizas La jubilean festvesperon. La nomoj de organizantoj certigas al la vespero altan, vere artistan nivelon.

La ĉi-tiea „Societo por belaj artoj“ instigita de la Organiza Komitato, preparas por la Kongresa semajno, en sia palaco specialan ekspozicion de pola pentr-kaj skulptarto. La surskriboj kaj katalogoj estos redaktitaj en Esperanto. Tiun sukceson oni ŝuldas al kunhelpo de S-o Leonard Lepszy, sekretario de la citita Societo kaj samtempe ano de la Kongresa Komitato.



Krakovo. Kolonaro de Nacia Muzeo „Sukiennice“.

Dezirante, ke la esperanta ekspozicio, aranĝota okaze de la Kongreso estu efektive fidela revuo de nia 25 jara movado, ne ree faras alvokon al ĉiulandaj samideanoj, ke ili helpu la ekspozician sekcion (S-o Benedikto He-

rold, Lwów, Potockiego 22, Aŭstrio—Galicio) sendante librojn, broŝurojn, afiŝojn kaj ĝenerale ĉiuspecajn dokumentojn kaj eldonajojn, laŭ la supra adreso.

Loka Organiza Komitato.

El kongresaj regionoj.

Verŝajne al ĉiuj legantoj estas konata la vilaĝa nomo: Zakopane.

Bonvolu do, Estimataj Samideanoj, permesi al mi priŝkribi mallonge ĉi-tiun lokon.


Zakopane estas la montara, pola vilaĝo konata de kelkaj jarcentoj, kiel loko de homa ekzistado kaj de kelkaj dekoj da jaroj, kiel restadejo por pli riĉa publiko kaj fine kiel aera kurac-loko.

Ĝi kuŝas en sud-okcidenta iama

pola regno, nome en ĉi-tiu parto, kiun antaŭ cento da jaroj okupis Aŭstrio. Ĝia topografia situacio estas tre oportuna. De nord-okcidenta flanko defendas ĝin kontraŭ malvarmaj ventoj la monto Gubałówka (Gubaluvka), ĉe kies piedoj trafluas Zakopianka-rivereto. En suda flanko etendiĝas la ĉeno de Tatraj-montegoj.

Super la vilaĝo reĝas la plej proksima pinto Giewont (Gievont 1900 m.). Malantaŭen disvastiĝas la pli altaj Tatraj-pintoj. Inter ili Zawrat (Zavrat 2168 m.), kie eĉ dum varmegaj, someraj tagoj oni rakontas glaciaron.

Iom pli malproksime: pinto Mnich (Mniŝ



Tatroj.

Ganek kaj Wysoka.

2064 m.) ĉe kies piedoj kuŝas sin du lagoj: Czarny Staw (Nigra lageto 1585 m.) kaj Morskie Oko (Mara Okulo 1393m.).

Al ĉi-tiu lasta kondukas el Zakopane la bone konstruita kaj konservata, 36 klm. longa ŝoseo. La ekskurso al Morskie Oko estas la plej bela kaj vidaj-riĉega. La ŝoseo volviĝas serpent-simile, kaj ĉiu fleksiĝo donas novan vidaĵon, plenan de ĉarma impresoj. Tiun ekskurson

oni povas entrepreni per veturiloj aŭ aŭtomobiloj, kiuj estas ĉiu-momente lueblaj.

Mi povas tamen garantii, ke ĉiu eĉ plej mallonga ekskurso estas ĉarmoplena, donanta al vizitantoj la impreson, kiun oni povas ricevi nur en sovaĝaj, plenuj de danĝeroj Tatraj-montoj.

Tiujn mirindaĵojn de nia lando—kompreneble nur somerajn—vidos kaj admiros la Okanoj, kiuj bonvolos viziti la Tatraj-montojn, kaj mi jam hodiaŭ de ĉi-tie diras al ili: Bonvenu! Ĝis la revido!

W. G.

Reformo de la nutrado.

La tago-post-taga pligrandiĝo de la nutraj-preztoj, kiuj precipe en la malpli multe progresintaj landoj ĉiam pli malfaciligas la vivadon de la plej larĝa parto de la loĝantaro, kaj la plej modernaj rezultatoj de la esploroj de la nutraĵa higieno, kiuj, dank' al la popularigo de la sciencoj ne restas plu sekreto de la scien-cista kasto, paralele metas antaŭ la publika atento la grandan demandon pri la nutraĵa-reformo. Kion la Vegetarista movado en sia rondo jam de longe deklaris, tion eksonigas voĉoj ekster ĝi ankaŭ: ke la ekonomian principon oni devas enkonduki ankaŭ en la nutradon, por tie aŭkaŭ „akiri plej bonan rezultaton per plej malmulte da elspezo“. La eksperimentoj de la dana kuracisto *Hindhede*, brile montras, ke tiu problemo estas bone solvebla, eĉ ke nin nutrante plej ŝpare—t. e. manĝante malmultekostajn manĝaĵojn kaj nur tiom, kiom estas nepre necesa—la higienan postulaton ni pli bone plenumas, ol per la kutima malŝpara maniero. Kvankam tute ne sur vegetara fundamento, sed nur ekonomia, *Hindhede* alvenis al la principo de la Vegetaristoj—nur, ĉar la viando por multe da mono donas al ni malmulte da nutrovaloro. Nur flanke li rimarkas kelkajn higienajn malpreferaĵojn, kiuj troviĝas precipe ĉe malpli multekostaj viandoj.

La laboradon kaj praktikajn rezultatojn de *Hindhede* ebligis la pli novaj esploroj de la scienco, kiuj konstatas, ke proksimume triono de la albumeno estas nepre necesa por la homo, kiel parto de lia po-taga manĝaĵo. Ĉar la scienco opiniis la viandon necesa, nur por ke ni povu ricevi la grandan kvanton de la nitrogenenhava nutraĵo, t. e. 118 gramojn, kio faras la kvinonon de la po-taga nutrovaloro: (tio estas neebla sen viando, aŭ malfacila). Post la rezultatoj de pli precizaj esploroj ĝi fariĝas tute nenecesa, ĉar 60 gramoj da albumeno, do unu dekonon de la ĉiutaga nutraĵo, estas pli ol necesa, kaj tiu kvanto sufiĉe estas liverata de la plej malmultekostaj manĝaĵoj vegetajaj. Se ni rigardas la necesan kvanton de la anorganikaj saloj, la pli malmultekostaj manĝaĵoj estas el tiu vidpunkto eĉ pli bonaj, ol la viando kaj la pli rafinitaj manĝaĵoj, kaŭzoj de multaj malsanoj.

Hindhede staras sur la fundamento de jenaj postulatoj: Ĉiutage ni konsumu 2,500 kaloriovaloran manĝaĵon kaj maksimume 60 gramojn el tio estu nitrogenenhavaj—plu manĝi est-

as malekonomia kaj eĉ malsaniga. Se ni klopodas ĉi tion plej malkare kunmeti, la pluaj postulatoj aŭtomate plenumiĝas. Li konsilas precipe tri specojn de manĝaĵoj: grenojn, en formo de kaĉaĵoj kaj pano, terpomon, kaj buteron, ĉu naturan ĉu artefaritan, laŭ volo kaj gusto. Fruktajn, legomajn, sukerojn, spicojn k. c. li aldonas por gustigo kaj variigo, kio ja estas ankaŭ necesa.

Li donas en sia libro, krom la teorio ankaŭ praktikajn instruojn, kaj receptojn kaj alvenas al la grava rezultato, ke, laŭ la prezoj en Danujo, el la po-taga sumo de 0,15—0,18 Sm. oni sen ia manko povas vivi kaj labori, kaj se oni oferas 0,25—0,35 Sm. po persono kaj tago, ĉiutage abunde ni povas al ni liveri forton kaj sanon en formo de bongustaj nutraĵoj, se nur ni akceptas kaj sekvas lian sistemon. Laŭ ni paroli lin mem en la antaŭparolo:

„1. Mi volas instrui al la homo, kiu havas 5,000 Sm. da jara enspezo, ke li povas multe pli sane vivi ol li nun faras.

„2. Mi volas instrui al la homo, kiu havas 1500 Sm. da jara enspezo, ke li povas multe pli malmultekoste vivi ol li nun faras. Estas tute nenecese elspezi po tago 1½ ĝis 1 Sm. por nutrado: oni povas tute same bone, eĉ pli bone vivi por 0,25 ĝis 0,35 Sm.

„Mi volas instrui al la homo, kiu havas nur 400—(800) Sm. da jara enspezo, ke li ne devas malsati, se eĉ li nur 0,15—0,18 Sm. povas elspezi por manĝo po tage“.

Dekkvin jara praktika eksperimento pravis la ĝustecon de lia sistemo, t. e. li vivis laŭ tio dum tiu tempo. Liaj registaro kaj samregnaĵoj komprenis la profitojn de tio kaj helpas lin. Ni ne bezonas insisti pri la profito de tiu sistemo por la ĝenerala kulturo: la jara enspezo de miloj da familioj altiĝis je duono aŭ triono, kaj la ŝparata parto de la enspezo estas uzebla por pli altaj bezonoj: pli bona loĝado, pli bona edukado de la infanoj, pli da kulturbezonoj kontentigeblaj. Se ni aldonas la profiton en sano, en pli granda laborkapablo, en progresanta inklino al pli altaj vivceloj—kion *Hindhede* tre serioze asertas en sia libro—ĉiu homo devas konsideri, ĉu li ne fariĝu Hindhedeano

El „Esperanto“

R. Rajczl

LIBERA TRIBUNO. **Pri Centra Esperanta Organizo.**

S-o Bejot sendis al ni siajn opiniojn pri La Centra Organizo, sed ĉar la motivoj kaj opinioj kelkapunkte koincidis kun tiuj, presitaj en antaŭaj artikoloj pri la sama afero, — ni ĉi-sube citas nur fragmenton karakterizantan vidpunkton de S-o Bejot.

„Kun la lingvo Esperanto nedisigebla estas la esperanta kulturo, ĉar la granda supereco de la kreinto de Esperanto antaŭ aliaj aŭtoroj de internaciaj lingvoj, estas, ke li povosciis inspiri tiun ideon, kiu kreas tiun kulturon, la ideon de universala frateco de nacioj, de la devo de universala reciprōka helpado. Dank' al tiu-ĉi cirkonstanco—nia lingvo vivas, nia literaturo posedas la belegajn poeziojn, nia movado posedas siajn apostolojn, kaj kio

estas la plej grava, la tuta nia anaro kun la lingvo adoptas ankaŭ la esperantan kulturon.

Kaj la peresperanta laborulo memvole aŭ malgraŭvole fariĝas la poresperantulo

Do se oni ne povas apartigi poresperantan kaj peresperantan agadon oni ne bezonas krei du apartajn organizaĵojn, tiom pli, ke en nuna stato de nia afero tio ĉi disigas niajn ankoraŭ ne tro grandajn fortojn kaj ke la kunigo de naciaj propagandaj societoj kun U. E. A. ne signifas la seniĝon de la memstareco. La propagandaj societoj kaj ĉiuj ĝisnunaj institucioj, *kunfederiĝas sur la fundamento de U. E. A.*, konservante la necesan memstarecon de ĉiu organismo kaj kunagante en ĉiuj komunaj aferoj“.

Unu el riproĉoj.

(Babilado)

»Socio ne havas rajton senutile perdati siajn eĉ plej malgrandajn fortojn« St. A. Dobrzański (A) mokantoj).

El la multaj riproĉoj, farataj al Esperantistoj, ekzistas la unu, kiu igis min pli profunde primeditadi.

Mi permesas al mi paroli pri ĝi ĉar, eble, iaj Esperantistoj povas havi ankoraŭ ian dubon aŭ nesufiĉe klarigitan demandon rilate al tiu riproĉo.

Sur la fundamento de la supre citita principo niaj kontraŭuloj riproĉas, eĉ kulpigas nin ke ekzistas tiom da sferoj de laboro kaj malfeliĉo, kiuj atendas nian kunagadon, ĉu en instruado de analfabetoj, ĉu en plibonigo de la stato de proletario, ĉu en ekonomia kaj socia stato de la lando, ĉu ĝenerale en la bonfarado, k. t. p.

S-ro St. A. Dobrzański en la artikolo „Al mokantoj“ (vidu jarkolekton de „Pola Esp.“ „Antaŭen kun kredo“) respondas al tiu ĉi riproĉo kaj tre lerte pruvas la multoblan utillecon kaj la ŝparemon de energio, atingatan per la lernado de unu helpa lingvo internacia anstataŭ de kelkaj vivantaj.

Traleĝinte ĉi tiun pensoplenan artikolon mi resumas jenajn konsiderindajn ideojn.

En la sama organismo ĉiuj funkcioj agadas egalmesure. Se iu organo estas trudita pli labori, la ekvilibro rompiĝas, tiu ĉi organo pli disvolviĝas, sed la aliaj pro tio suferas.

Tiel same en la normale disvolviĝanta socio—ĉiuj funkcioj devas agadi egalmesure;—oni ne povas sen malutilo por la aliaj funkcioj favori unun aŭ trudi alian.

Interalie la na nacieco kaj internacieco en la normala socio devas esti en la konstanta proporcioj: troa nacieco sanĝiĝas en malutilan ŝovinismon, kiu kaŭzas kulturen malkreskon; troa nacieco minacas nuligi la diversecon de nacia kulturo, kara al ĉiu popolo.

La scienco, la artoj apartenas al tuta homaro, kreas la ĝeneralan civilizacion, kaj pli aŭ malpli granda kapableco de la nacio — alproprigi la akiraĵojn de la scienco, arto, plifortigi per tiuj akiraĵoj sian kulturon, industrion, komercon—decidas en kia grado la dirita nacio progresas.

Tute prave diras S-ro A. L. Stahl en la artikolo „Internacia flegado de l' nacieco“ („Revuo“ Novembro), ke „Nacieco sen internacieco malhelpas la kulturprogreson kaj ŝtonigas la gentojn“.

Esperantistoj komprenas la neceson de la internacieco kaj la valoron de la nacieco, ili penas nutri la naciecon per la internacieco, ne devoĵigante la nacian kulturon.

Ni do ankaŭ plenumas la socian servadon, egale necesan kaj utilan, kiel aliaj servadoj, kaj plenumas ĝin bone, ĉar amante ĝin, ni laboras plej sindoneme.

Bejot.

K o n s i d e r u

Pacienco.

Pacienco estas la forto por atendi. Sen pacienco oni ne povas persistadi sian principon. Kiu grenon volas rikolti, devas lasi al ĝi tempon por maturiĝi. Kiu akcelas la laboron de l' naturo, ĝin malbonigas. La pacienculo plenumas siajn studojn, dum la malpacienculo jam longe estas en la socio, sed ne koncernas la demandon kiam, sed kiel oni eniras la socion. Kiu deziras fortikan konstruaĵon, devas atendi ĝis ĉiuj fundamentoj estas metitaj. Pacienco konstruis preĝejojn kaj fosis ĉiujn minojn. La arto por sukcesi estas: scii kiel longe oni devas atendi. Multaj malsukcesas pro sia malpacienco. Kiu ne vane volas vivi, ne devas esti malpacienca, Pacienco neniom rilatas kun malrapideco, sed nur kun longa laborado. Oni laboru ne malrapide, sed longe, sen superrapideco. Superrapideco ĉiam estas malbona.

Memfido.

Memfido estas la konfido al propra forto. Ĝi apogas sin sur la kredo, ke oni, kun bona principo, per propra forto, povas veni inter limoj atingeblaj por homoj kie ajn oni volas. Ĝi estas nemankinda por bona plenumo de nia tasko. Ni ne pernesu, ke oni ĝin deprenu de ni, kaj neniokaze ni deprenu ĝin de iu alia. Ĝi instruas al ni uzi ĉiujn niajn fortojn kaj streĉi ilin ĝis la fino. Ĝi faras nin sendependa de l' kunlaborado de aliaj kaj nesentemaj por la kontraŭagado de aliaj. Ĝi lasas nin konservi la kuraĝon ĉe kontraŭvento kaj senventeco.

Memfido estas la fundamento de nia sendependeco.

el la libro „Karaktero“.

Amo al la homaro estas torento, kiu purigas kaj plipofundigas amon al la patrujo.

E. Orzeszkowa

F a k t y.

Esperanto w Jerozolimie.

Przegląd Touring-Clubu we Francji donosi, że władze Jerozolimy, uznając użyteczność języka pomocniczego w środowisku tak kosmopolitycznym, odwiedzanym stale przez licznych cudzoziemców, postanowiły wprowadzić Esperanto do wszystkich afiszów i ogłoszeń publicznych.

W ostatnim numerze z d. 28/1 widzimy doskonale artykuł p. H. Muffong p. t. „Francuski, Łacina i Esperanto.

Nowe oficjalne sukcesy.

Dnia 29 Lutego Rada miejska m. Hagi uchwaliła 19-ma głosami przeciwko 15-u oficjalne wykłady Esperanta. Wkrótce zostanie otwarty pierwszy taki kurs w Hadze.

Na posiedzeniu Komitetu Naukowego przy Ministerjum Przemysłu i Handlu — na propozycję p. Ministra odbyło się posiedzenie na którym rozpatrywano wnioski A. M. Niedoszynina o wprowadzeniu Esperanta do pro-

gramów szkół będących w zawiadywaniu pomienionego ministerjum. Po żywej dyskusji w której zabierali głosy prof. Zaleski, przedstawiciel Ministerjum Oświaty i Główny Inspektor A. G. Malinin — Komitet *jednogłośnie* postanowił: przyzwolić na wykłady języka Esperanto w charakterze przedmiotu nieobowiązkowego.

Winszujemy rosyjskim esperantystom! Pierwszy krok zrobiony!

Petersburskie Tow. Esperantystów.

Zostało prawnie zarejestrowane petersb. Tow. Esperantystów. Członkami założycielami są: Rzec. Radca tajny I. F. Onoszkowicz-Jacyna (dyrektor komitetu rannych) Radca tajny A. A. Iwanicki (członek Rady Ministerjum Komunikacji). Rzec. Radca stanu A. I. Nikolajenko (b. dyrektor departamentu Izby Skarbowej) i znany esperantysta N. P. Ewstifejew.

Korekto. En la noto pri la edziĝo de S-o M. Czerwiński (vidu la Martan n-ron) oni erare forlasis linio-finon de post la vorto: bondeziroj. „Ripetantante vortojn de la esperanta poeto“:

Red.

El Esperanta Mondo.

Pri la deveno de la Verda Stelo.

Jen kion skribas D-ro L. L. Zamenhof al „The British Esperantist“ pri la deveno de la Verda Stelo—simbolo de Esperanto:

Pri la deveno de nia verda stelo mi nun jam ne memoras bone. Ŝajnas al mi, ke pri la verda koloro iam atentigis min S-ro Geoghegan kaj de tiu tempo mi komencis eldonadi miajn verkojn kun verda kovrilo (la atentigo estis tute senintenca). Pri unu broŝuro, kiun mi tute hazarde eldonis kun verda kovrilo, li rimarkigis al mi, ke tio estas la koloro de lia hejmo, Irlando; tiam venis al mi en la kapon, ke ni povas ja rigardi tiun koloron kiel simbolon de *Espero*. Pri la kvinpinta stelo, ŝajnas al mi, ke unue ĝin presigis sur sia gramatiko S-ro de Beaufront. Tio plaĉis al mi kaj mi prenis tion kiel signon. Poste per asocio de la ideoj aperis stelo kun verda koloro.

30. XII. 1911.

L. L. Zamenhof.

Konsilo por tradukantoj. Oni zorge elektu nur bonegajn klasikajn kaj fame konatajn verkojn por la traduko, ili ne estu tro malmalmodaj. Ni akiru la permeson de modernaj aŭtoroj pro la traduko aŭ ni pagu la postulatan de la nacia eldonisto prezon. Ni ne povas devigi la Esperantistaron aĉeti niajn librojn, sed ni povas liveri al ili bonajn verkojn. Oni volonte

aĉetos bonajn verkojn, eĉ se ili estas ampleksaj kaj sekve iom multekostaj. Malgrandaj libretoj facile perdiĝas, malaperas, la grandaj dailrados.

La raporto de „Int. Unuigo Esp. Verkistoj“

Tutmonda Jarlibro Esperantista 1912.

Ĉiuj samideanoj: Instruistoj, komercistoj, Korespondantoj k. t. p. enskribigu sian nomon en ĝin. Tre zorge ellaborata, sur nova plano tiu jarlibro estos, certe, en manoj de miloj da esperantistoj.

La enskribo estas senpage aŭ ĉe speciala anonco pagebla laŭ kondiĉoj sciigataj post peto.

Oni devas sin turni kiel eble plej baldaŭ al „Tutmonda Jarlibro Esperantista“, Centra Oficejo, 51, rue de Clichy, Paris.

Zaporojje—Kemenskoje.

Ni ricevis programon de la okazinta en Z. koncerta vespero. Ni jam multfoje laŭdis senlacaĝan agadon de „viglulo“. S-o Radzimiński, estro de la loka esperantistaro, kiu tute meritas tiun nomon.

Ni d'istance aplaŭdas ĉiujn partoprenintojn de la koncerto—do s-oj: Ihenholz, Mangal, Mihailov, Stanĉik, Goraleviĉ kaj aparte S-on Radzimiński.

Oferdonacoj por la konkursoj premioj.

Nia alvoko al oferemaj samideanoj ne restis sen eflo: ni ricevis kelkajn mondonacojn, kiujn, ni esperas—sekvos la pluaj.

Al ĉiuj oferdonintoj ni esprimas koran dankon.

La suba tabuleto prezentas staton de la oferdonacoj.

Oferdoninto.	I-a temo Beletristiko		II-a temo Poezio		III-a temo Scienco	
	Sm.	sd.	Sm.	sd.	Sm.	sd.
	Red. de „Pola Esperantisto“	10	—	5	—	10
Red. de „Germana Esperantisto“	8	—	4	—	8	—
S-o John P. Nix el Eastbourne	4	—	2	—	4	—
S-o Talat- Kielpsz	—	20	—	10	—	20
S-o Litewka el Olkusz	—	40	—	20	—	40
S-o M. Buloĉkin el Moskvo	—	10	—	10	—	—
Pola Esp. Societo en Varsovio	8	—	4	—	8	—
Sume	30	70	15	40	30	60
Mankas por minimumo de la premioj.	69	30	34	60	69	40
Minimumo de la premioj.	100	—	50	—	100	—

N e k r o l o g i o .

Tre malĝojigan sciigon alportis telegrafo el insulo Samos:

Andreo Kopassis Effendi, Alta protektanto de nia kara afero, kiu la unua havis kuraĝon enkonduki Esperanton, kiel devigan objekton en ĉiujn lernejojn de la insulo — jam ne vivas plu.

Fortoplena, meze de la laboroj por bono de la regata lando, li mortfalis trafita de mortiga kuglo el manoj de mizeranima mortiginto.

La mortigita Princo—samideano estas politika viktimo de siaj simpatioj al progresema nov-turka partio kontraŭ kiu batalas grekaj, naciismaj patriotoj. Funebro ektuŝis ĉiujn noble batantajn korojn, ne nur de Samosaj civitanoj, sed ankaŭ de la tutmonda samideanaro.

Pri tiaj viroj diras la esperanta poeto:

*La mond' aliĝos, la temp' pasos for'
Sed vivos eterne pri ili memor'*

Li ripozu en paco eterna!

K r o n i k o .

Varsovio.

Pola Esperanta Societo.

7-an de marto okazis en Societo „Uranja“ monata kunveno de varsoviaj esperantistoj:

S-o Brzostowski prelegis pri „Ideo kaj celoj de Esperanto“.

S-o A. Grabowski, prezidanto komunikis al la ĉeestantoj vicon da faktoj pri esperanta tutmonda movado, „Clou“ de vespero estis forta, impresiga deklamado de S-o Grabowski, kiu diris du originalajn poeziaĵojn „Al Semanto“ kaj „Reveno“, verkitaj de li por la VIII-a kongreso. La poeziaĵoj — kiel ĉiuj de S-o G. apartenas al tiaj, kiuj „sur flugiloj de facila vento — de la loko flugos al la loko“.

Viglaj diskutoj pri propagandaj rimedoj — finis la vesperon.

Venonta kunveno estos ĝenerala, jara kun elektoj de nova komitato kaj partoprenebla nun por anoj de la Societo, kiuj ĝustatempe ricevos sciigojn.

Kraków. Ĝenerala kunveno de l' anoj de la societo „Esperanto“ okazis la 29-an de februaro. La raporto de l' sekretario elmontris viglan kaj konstantan disvolviĝon de la societo en la pasinta jaro: la nombro de l' anoj kreskis el 73 ĝis 126, okazis 11 kursoj, en kiuj partoprenis kune 240 personoj. La societo aranĝis tre bele sukcesintan publikan koncert-vesperon kaj kune kun la Akademio Asocio balon, eldonis luksan gvidlibron tra Kraków kaj lastatempe lernolibron de Esperanto. Multaj artikoloj kaj informoj en la gazetoj, ekinteresigo de diversaj urbaj institucioj estas ankaŭ pruvo de agemeco de Krakovaj samideanoj, kiuj per tio penis prepari la kampon por la Oka kongreso kaj ĝia komitato.

En la estraron oni elektis sekvantajn per-

sonojn: Prof. Odo Bujwid (prezidanto), Józef Goldman (vicprez.), Bronisław Kuhl (1 sekretario), F-ino Gizela Morgenstern (II sekr.), Franciszek Zieliński (bibliotekisto), Władysław Grabowski (kasisto), Stanisław Rudnicki, Leon Schleichkorn, D-ro Henryk Tislowitz. Revizia komisio: D-ro Leon Rosenstock, Antoni Tyczka, Kazimierz Zajączkowski.

Laŭ la propono de S-ro Kuhl, starigita en la nomo de l' noveelektita estraro, la kunveno unuvoĉe kun multaj aplaŭdoj nomis S-ron Jan Kaszycki, ne povanta pro malbona stato de sia sano akcepti reelekton en la estraron, honora membro de l' societo; montrante tiel sian dankemon al la estiminda ano pro lia senlaca kaj senbrua laborado por la disvolviĝo de nia ideo kaj de la societo.

Fine oni alvokis anojn de la Societo aboni „Polan Esperantiston“.

M.

Lwów.

Laŭ komuniko, kiun ni ricevis el Lwów, esperanta movado en ĉi-tiu urbo multe plivigliĝis. Esperantan kurson kondukatan de S-o Łazica partoprenas 50 personoj. En Aprilo komenciĝos nova kurso kondukota de S-o Wierzchowski. En la societo ĉiumarde okazas prelegoj; jam estis prelegitaj temoj: Pri forto de virino (S-o Wierzchowski), Kiamaniere oni povas forigi militojn el la mondo (S-o Wierch) Pri militoj (F-ino E. Einschlag) Nutra sistemo de D-ro Hindhede (S-ino Fels) Agado de la Ivova libervola savista societo en 1911 j. (D-ro Fels) Ĉu la tutmondo estas eterna kaj senfina? (S-o Chmielowicz) La gravitado kaj la amo, du fortoj tutmondaj, materia kaj spirita kaj „Ĝis kiam daŭras juneco (S-o Wierzchowski) Pri memedukado (F-ino Einschlag).

Jen kiel interese oni povas kunvenadi kaj pasigi la tempon, se inteligentaj anoj volas ion fari.

Pola gazetaro.

Lastatempe ni trovis simpatiajn artikolojn pri Esperanto en sekvantaj gazetoj:

Kurjer Polski.

Bonega artikolo pri VIII-a kongreso refutanta malsaĝajn riproĉojn de la ŝovinisma gazeto „Głos Warszawski“.

En la alia n-ro ni trovas artikolon represitan el „Pola Esper.“: „S-ro Forel pri Esperanto“.

Kurjer Poznański. Represajo de la artikolo el „Kurjer Polski“.

Kurjer Kaliski. — Artikolo. „Patriotismo kaj Esperanto“ de S-o A. Grabowski.

— Artikolo pri Krakova kongreso.

— Artikolo „Esperanta kaj ĝia rolo“ verk. de S-o B. Szczepankiewicz, tra lerte refutas malamikan kaj tute sensencan artikolon de S-o Jankowski, pres. en senajna revuo „Świat“.

Ślowo. — Represajo de la artikolo „Prof. Forel pri Esperanto“ el *Kurjer Polski*.

— Bonega korespondajo el Krakovo pri la kongreso—verk. de Nawój.

Świat (Mondo) Kiel ni eksciis kelkaj samideanoj ĉesis aboni „Świat“ pro ĝia malamika artikolo pri Esperanto, skribita de J. Jankowski. Tre ĝustel!

Korespondajoj.

Esperanta movado en Galicio.

Kun ĉiu tago kreskas nia anaro. Feliĉe kaj ĝojige, ĉiam pli kaj pli grandiĝas la rondo de kunbatalantoj, nia afero komenciĝas esti serioze pritraktata, serioze akceptata. Trapasis la tempoj, en kiuj oni estis devigataj honti pro verda stelo. Hodiaŭ ĝi fariĝis jam en Galicio la insigno de l' prudenteco kaj de l' „bona tono“; eĉ ĝis nun ne esperantiĝintaj personoj, eĉ la galiciaj eminentuloj, komencas al ĝi konfidi, komencas ĝin ŝati. Kaj tiu-ĉi ŝato kaŭzas, ke la aranĝataj kursoj trovas ĉie eĉ troplenan nombron de lernantoj. En Krakovo estas kondukataj samtempe 5 kursoj, ne enalkulante multajn privatajn po kelke da personoj; du da ili estas kondukataj de S-o *Br. Kuhl*, aŭtoro de la plej nova lernolibro por poloj, du aliaj—de S-oj *Czubyński* kaj *Kriss* en Krakova universitato, kaj la lasta, destinita speciale por Krakovaj artistoj, ludontaj dum la kongreso „Mazepa“ de Słowacki, estas gvidata de d-ro Rosenstock. En Bochnia estas ankaŭ anoncita la kurso de Esperanto, kondukata de F-ino *Z. Kronenberg*. En *Tarnów* enskribiĝis por la kurso 70 personojn malgraŭ iome tro granda, ĉar 7 krona, kotizajo. Se oni pripensos, ke eĉ la malgrandaj urbejoj, kiel *Wiśnicz Nowy*, posedas dekelkon da esperantistoj, kaj ke samtempe ankaŭ en orienta Galicio la movado pliriĉiĝas, oni devas konfesi, ke la ondoj de l' Esperanto abundiĝas, disfluigiĝas kaj forte frapas skeptikulojn

Tuta galicia gazetaro akceptas kaj presas plej bonvole artikolojn pri Esperanto.

La antaŭ nelonga tempo aperinta verketo

de Leon Drojecki, titolita „Esperanto i jego zastosowanie w praktyce“ (Esperanto kaj ĝia praktika uzado) estas unua numero da „Biblioteko por propagando de l' Esperanto en Polujo“. De pola esperantistaro dependas ke kiel eble plej baldaŭ aperu sekvantaj kajeroj; propagandu do bonvole la aperintan broŝuron enmanigadu ĝin al skeptikuloj!

Mi povas certigi, ke laŭ ĉiuj esperoj — la tempo de l' semado baldaŭ finiĝos kaj komenciĝos riĉa rikolto.

Des pli fervore, des pli ĝoje ni laboru.

Tarnów, Marto.

L. Kronenberg.

Moskvo.

Traveturante Moskvon, mi eniris tiean Esperantan Librejon, Twerskaja 28, por aĉeti kelkajn esperantaj librojn, kiujn mi ne sekse- sis trovi en Varsovio. Mi supozis trovi nur esperantan fakon ĉe la rusa librejo. sed mi estis tre agrable mirigita, ekvidinte sufiĉe grandan magazenon de *memstara* esperanta librejo, plenplena de esperantaj libroj, broŝuroj, gazetoj kaj esperantajoj, kun 5 persona personaro, flue parolanta esperante.

Kiel informis min S-o Saŝarov, posedanto de la Librejo, ĝi enhavas librojn por 19.000 Sm. *kontante!*. Ĉiutage oni elsendas en provincon esperantojn librojn meze por 40 Sm.

La Librejo ekzistas jam kvar jarojn, grade kaj konstante plivastiĝante, kaj nune jam oni povas konsideri ĝin kiel firme memstare prosperanta. Disvolviĝo de la afero estas tiel kontentiganta, ke jam ĝisnuna loĝejo estas nesufiĉa, kaj S-ro Saŝarov serĉas pli grandan

magazenon. Esprimante mian admiron al la lertaj kaj viglaj aranĝintoj kaj gvidantoj de la Librejo, mi deziras al ili la plej vastajn sukcesojn.

Laŭ la afabla invito de S-o Saŝarov kaj aliaj moskvaj samideanoj mi vizitis vastan Loĝejon de la „Moskva Esperanta Societo“ kaj „Instituto“ (Lubjanskij projezo); bedaŭrinde mi ne povis ĉeesti la kunvenon, kiu okazas tre multenombre dufoje semajne; tamen mi sukcesis renkonti tie S-ojn Saŝarov, Ajspurit,

Romanoviĉ kaj Ges-oj Kotzin, kaj en ilia simpatia akompano mi sentis ĉarman, fratan atmosferon de esperanta hejmo.

Vidinte tiom da homoj, forte kredantaj je estonteco de nia afero, dediĉantaj al ĝi tiom da farto, solida kaj vigla laboro kaj energio, mi adiaĵis la moskvajn samideanojn kun koro pli vigle batanta, pli forta, kaj pli kredanta, — pro kio mi pere de „Pola Esperantisto“ esprimas al moskvaj samideanoj mian profundan kaj koran dankon.

Januŝ.

Bibliografio.

Pluaj Argumentoj por prui, ke la teorio „La radikoj en Esperanto havas gramatikan karakteron“ kontraŭstaras la intencojn de la Fundamento de E. Ĉefeĉ.

S-ro de Saussure prezentis al la Akademio por konsiderado sian proponon „Pri la logika bazo de la vortfarado en Esperanto“, bazitan sur la teorio, ke en la Universala Vortaro la radikoj jam havas gramatikan karakteron.

Kontraŭe al s-ro de Saussure, la aŭtoro de la supra broŝureto penas prui, ke, laŭ la fundamento, la radikoj havas nenan karakteron gramatikan, sed ke ili estas indiferentaj kaj neŭtralaj. Laŭ s-ro Ĉefeĉ estas nur distingebaj radikoj, signifantaj agon aŭ energion, de tiuj kiuj signifas la portanton aŭ suferanton de la ago aŭ energio. Sekve ili estas abstraktaj aŭ konkretaj. La teorion de S-ro Saussure s-ro Ĉefeĉ opinias danĝera por la estonteco de nia lingvo.

Laŭ nia opinio nenia teorio, celanta la klarigon de iu esplorata scienca fakto povas fariĝi danĝera por tiu fakto. Diversaj teorioj povas nur pli aŭ malpli bone klarigi la fakton, sed neniel ĝin tuŝi. Se du kontraŭaj teorioj klarigas la saman fakton egale bone, ili estas ambaŭ bonaj, ĝis kiam montriĝos aperoj ne klarigebaj per unu el tiuj teorioj.

Por la esperantistaro povas esti tute indiferente, kiu el la ambaŭ instruitaj kontraŭuloj estas prava. La lingvo Esperanto estas fakto ekzistanta, netuŝebla de la teorioj. Se montriĝus, ke unu el la kontraŭuloj devas falsi la fakton, tio estas, ke li postulas eĉ plej malgrandan ŝanĝon de nia komune uzata lingvo, lia teorio tuj montriĝus malvera.

Sed eble oni povas klarigi la aperon de tiel esence kontraŭaj du teorioj por klarigo de la sama fakto. La homa lingvo en diversaj stadioj de disvolviĝo estas malsame konstruita. La unuaj sonaj simboloj de la ideoj ĉe niaj infanoj ne havas gramatikan karakteron,

same ankoraŭ hodiaŭ la monsilaba lingvo ĥina ne konas niajn gramatikajn kategoriojn de vortoj. Aliflanke la popoloj parolantaj lingvojn fleksiajn aŭ aglutinajn uzas vortojn kun gramatika karaktero. Tiujn du faktojn genie kombini s-ro Zamenhof en sia kreaĵo. Por ni hindo-eŭropanoj estus tre malfacile lerni la radikojn kaj abstrakti ilin de la gramatika karaktero, kiujn ili havas en la nacia traduko; tio ankaŭ klarigas la fakton, ke la teorio de Saussure trovis tiom da aprobo. La per si mem bonega teorio de S-ro Ĉefeĉ eble pli kontentigus la ĥinojn, estante por ili pli natura.

Ĉiuokaze neniu nova teorio devas influi nian lingvon komune uzatan: tiam neniu teorio estos danĝera por ĝia estonteco.

A. G.

Pri esperanta literaturo. Parolado de Edmondo Privat. Kolekto de la Revuo. Paris. Librairie Hachette et C-ie. 1912. paĝoj 24. Prezo Fr. 0,75.

Ĉe la Sepa universala kongreso de Esperanto en Antverpeno, okaze de la disdono de premioj en la Flandra Operejo, s-ro Privat eldiris tiun ĉi paroladon, kiu aperas nun en formo de elegante eldonita libreto. En ĝi brilas ne nur plenforte la granda oratora talento de l' verkinto, sed s-ro Privat prezentigas samtempe kiel profunda moderna lingvoscienculo, kiu sian sciadon pri la vivo kaj disvolviĝado de lingvoj enĝenerale, mirinde lerte aplikas por klarigi la manieron, kiel nature diskreskas la genia kreaĵo de d-ro Zamenhof, la nova vivanta lingvo Esperanto. „Lingvo ne estas fiksita signaro, sed ĝi senĉese moviĝas. Ĝian unuecon kreas la komuna uzado. Lingvo vivas, kiam homoj metis en ĝin sian animon. Esperanto ne estas propono, ĝi estas fakto. Estas ridinde diskuti pri arbitraj ŝanĝoj en bele floranta kaj vivanta lingvo“. Tiaj saĝaj vortoj meritas eble plej vastan diskonigon.

A. G.

Revuo de la Gazetoj.

Kun vera ĝojo ni lastatempe konstatis evidentan progreson de esperanta gazetaro. Multaj gazetoj plivastigis sian amplekson kaj plibeligis la aspekton. Bona presmaterialo, ofte bela papero kaj eleganta presado faras ensume agrablajn impresojn de seriozeco.

„Ĉiam antaŭen!“, ne estas nur sensignitaj vortoj.

(2|III) **Monda Poŝto** (25 Februaro).

(2|III) **Kovno-Esperanto** (23 Februaro).

(4|III) **Antaŭen!** (Marto).

(3|III) **Poŝta Esperantisto** (Februaro).

(4|III) **Mitteilungen** (Marto).

(4|III) **La Verda Standardo** (Februaro).

(5|III) **Rund um die Welt** (Marto).

(5|III) **The British Esperantist** (Marto).

La redukcio enkondukis tre laŭdindan kaj pleje imitindan fakon: La Esperanta Movado en Britujo—resumeto por alilandaj gazetoj.

La koncizaj notetoj tre plifaciligis kompilon de la gazetaj tutmondaj kronikoj.

(7|III) **Belga Katoliko** (Februaro).

(7|III) **Normanda Stelo** (Marto).

(7|II) **La Movado** (Marto).

(7|III) **Antaŭen Esperantistoj** (Julio k. Aŭg. 1911)

(8|III) **Franca Esperantisto** (Marto).

(10|III) **La Dek-Sepa** (Marto).

(10|III) **La Ondo de Esperanto** (Marto).

(11|III) **Internacia Socia Revuo** (Marto).

(11|III) **Paris-Esperanto** (Marto).

(11|III) **Mitteilungen** (Marto).

(11|II) **Kataluna Esperantisto** (Marto).

(12|III) **La Holanda Pioniro** (Marto).

(12|III) **Bulletin Officiel** (Marto).

(12|III) **Oficiala Gazeto Esperantista** (Februaro).

(12|III) **Esperanto** (15 Marto).

(15|III) **Germana Katoliko** (Februaro—Marto) kun aldono „Sport“.

(15|III) **Nederlanda Katoliko** (Marto).

(15|III) **Bohema Revuo Esperantista** (Februaro).

(18|III) **Espero Katolika** (Marto).

(18|III) **Belga Esperantisto** (Marto).

Historia skizo de Krakovo.

(18|III) **La Du Steloj** (Julio, Aŭgusto, Septembro, Oktobro, Novembro, Decembro).

(18|III) **Germana Esperantisto** (Februaro).

(18|III) **German-Aŭstria Esperantisto** (Marto).

(19|III) **Le Phare Sténographique** (Marto).

(19|III) **Riga Stelo** (Majo—Junio 1911 j.).

(21|III) **La Esperantisto** (Januaro k. Februaro). La gazeto nune aperas en Drezden 22, Leipziger str. 110 kaj estas lerte redaktata de S-o Hans Hurler.

(21|III) **Finna Esperantisto** (Januaro—Marto).

Reaperis post unujara ripozo nia Finna kolego. Bela, eleganta eldono konjektigas, ke la fortoj de finnaj samideanoj pliiĝis kaj la vivo de la gazeto estos pli daŭra.

Niajn gratulojn.

Le Monde Espérantiste (Marto) „Konkordo“ nova lingvo internacia. En mia artikolo, en Januara numero de *Le Monde Esperantiste*, mi skribas frazon: Partianoj pli Antidaj ol Antido mem (ekz. *Pola Esperantisto*), obstinaj malfeliĉuloj restas tiam solaj, kun jam de Antido forjetitaj signifoj.“

Ĉar tiu frazo ne estas tute klara kaj povas kaŭzi malkomprenajojn, mi deklaras, ke *Pola Esperantisto* staris kaj staras, ĝis nun, sur la bazo de Fundamento, kaj ke la vortoj *patrianoj de Antido* estis de mi uzitaj nur rilate al la teorio de derivaĵoj de Antido, aprobita de kompetentaj Esperantistoj.

Post la supraj klarigoj de s-o A. Zakrzewski mi reprenas la riproĉon de „konscia malverajo“, faritan al S-o Z. en „*Pola Esperantisto*“ № 2 de la 1912 j. sur la paĝo 39. J. G.

Lingva anguleto.

Konsiloj pri enkonduko de novaj vortoj en la komuna lingvo.

La Akademio, malaprobante energie la enkondukon en la komuna lingvon de superfluaĵaj, kaj per tio mem, nebonaj vortoj, atentigas la aŭtorojn de lernolibroj (vortaroj, gramatikoj, ekzercaroj) pri la danĝero de degenerado por nia lingvo, se ili arogas al si la rajton pro-

poni aŭ eĉ uzi aŭ citi novajn vortojn, ne pravigitajn de la ĝenerala kutimo.

La Akademio sekve forte konsilas al la aŭtoroj de gramatikoj kaj ekzercaroj, ke en siaj libroj ili uzu nur tiujn vortojn, kiuj troviĝas en la Universala Vortaro aŭ en ĝia Oficiala Aldono.

Al la aŭtoroj de vortaroj, ĝi konsilas, ke

ili sin konformu al la universala kutimo de la naciaj vortaristoj, laŭ kiu la verko pretendas kaj klasas fidele prezenti la lingvon, kiel ĝi efektive estas kaj ne kiel la aŭtoro volas, ke ĝi estu.

Al la Esperantistaro, en kies manoj nepre restas la sorto de nia lingvo la Akademio konsilas, ke ĝi uzu kun la plej granda mode-

reco sian povon enkonduki kaj, per uzo, aprobi novajn vortojn. Estas ĉies devo, antaŭ ol uzi novan vorton, zorge konstati, ke ĝi ne estas superflua, alivorte, ke ĝi ne estas antaŭebla per taŭga vorto, ĉiu fundamenta, ĉu almenaŭ tre ĝenerale uzata.

(El „Oficiala Gazeto“).

Humorajoj.

Korespondo. Panjo, mi volas skribi leteron al la pupo. Sed vi ja ne scias skribi?! Ah tio ne estas grava: la pupo ja ne scias legi.

el „La Ondo de Esp.“.

Leterportisto pri virinoj.

Leterportisto donis sekvantan karakterizon pri la virinoj:

La virinoj estas leteroj, kiujn Dio sendas teren por feliĉigi per ili virojn. La edziniĝinta virino estas letero trovinta sian adresaton; iam ĝi estas rekomendita, iam nefrankita kaj iafoje „rapida“. Ne edziniĝinta virino estas letero kun ne preciza adreso. Koketulinaj, volantaj esti de ĉiuj amataj, estas malfermitaj leteroj. La virinoj, kies fianĉoj estas ilin forlasintaj, estas leteroj sur kiujn la adresato skribis „mi rifuzas ĝin ricevi“. La virinoj kun riĉa doto estas monenhavantaj leteroj, kiujn ni akceptas plezure kaj post elpreno de la mono ni jetas leteron en la korbon. Ne taŭga virino estas letero resendita kun rimarko „nekonata adresato“.

„Belga Esper“.

Moderna muziko.

La gasto aŭskultante fortepianajn tonojn: — Kiel mirindan teknikon posedas Via filino! Nur kun tia lerteco oni povas ludi nuntempan repertuaron! Ĝi estas sendube Richard Straus!

— Ah, mi ne pensus! La ĉambristino forviŝas polvon el fortepiano.

Ĝusta kaŭzo.

— Kial vi hieraŭ ne venis en la kinematografon por vidi „vojaĝon ĉirkaŭ la mondo“?

— Hieraŭ mi estis en tia stato, ke la mondo vojaĝis ĉirkaŭ mi!

Volontiga anonco.

Ĉiu, kiu pruvos, ke niaj sanigaj piloloj estas malutilaj por sano, ricevos *lute senpage* tri skatoletojn da ili.

Dum miela monato.

— Via edzo estas instruisto en la gimnazio? Kion do Vi faras dum la edzo estas okupita?

— Mi korektas kajerojn de lernantoj. Por ĉiu trovita eraro, la edzo donas al mi kison.

— Tio estas tre ĉarma! Vi sendube korektadas ankaŭ la kajerojn de mia filo?

De via filo? Ho jes! Li estas ĉarma, aminda knabo! Hieraŭ li ree faris sesdek erarojn!

Li bone komprenis.

